



Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA – DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73

Telefone 4-8033

11.100 – Santos (SP)

SECRETARIA

Caixa Postal 07 – 1182

Telefone 42-9090

70.000 – Brasília (DF)

CGC Nº

00406 504/1000-06

BOLETIM Nº 28

AGOSTO/SETEMBRO DE 1977

ÓRGÃO OFICIAL DO B.K.E.

Redação: MARIA ALMADA



Busto de L.L. Zamenhof starigita en la Placo João Barbalho, en Santos, okaze de la XII Seminario de Esperanto kaj la geedzaj F.S. Almada

BELO HORIZONTE (MG) — CASAMEN-

TO — Realizou-se no dia 14 de setembro de 1977 na Igreja da Boa Viagem o enlace matrimonial da senhorinha Maria Angélica com o jovem engenheiro Ricardo, ela filha dileta do casal Bonifácio José Tamm de Andrada, secretário de Estado do Interior e Justiça de Minas Gerais e D. Amália Borges de Andrada; ele filho do casal Tommaso Morano, do comércio de Juiz de Fora (MG) e D. Edda Bonfante Morano.

Foram padrinhos no ato religioso o presidente do Conselho Brasileiro de Esperanto e Senhora, entre outros.

Este Boletim, associando-se aos amigos do Dr. Bonifácio José Tamm de Andrada, faz sinceros votos pela felicidade conjugal do jovem par.

☆☆☆☆☆☆

FRAÜLINO BEJO

F — lirtas rozoj sur la grundo de l'Espero!

R — egale dolĉan aromon el kamparo.

A — lloga etos' ekestas, milda vento,

U — nuigante, lule, al arbustaro!

L — aŭ la petola sonado de la birdoj,

I — nter la floroj kaj lumoj sur la herbo...

N — askiás la plej bela el la ĝardeno...

O — ornamo de la rosa verda ebeno!

B — edoj, ja kun ĝi, laŭtempe ekfloriĝos!

E — I kiuj multajn aliajn ni rikoltos!

J — am burĝonas en la grundo de l'Espero

O — rbukedo el la ĝardenistaj manoj!

Aparecido José Martins Caboclo

☆☆☆☆☆☆

BRAZILIO (FD) — Laŭ informo ricevita de ĝia sekretario, Brazilia Esperanto-Asocio havas novan direktaron: -Prez. Nid Dutra D'Amorim, vicprez. Enivaldo Alves Silva, sekr. Nelson Pereira de Souza, kas. Arlio Costa de Souza, Bibl. Judith Maria F. Barata. Ni gratulas la novan estraron de BEA, dezirante prosperon kaj fruktodonan laboron.

REJKJAVIKO (Islando) — En la 62-a Universala Kongreso de Esperanto, en Rejkjaviko, estis elektita nova estraro por UEA. Inter aliaj elstaraj esperantistoj elektitaj troviĝas nia samideanino Ursula Grattapaglia, por la fako "landaj asocioj kaj regiona agado en Brazilo.

Estas nepre necese havigi almenaŭ unu komitatanon por Latinameriko, ĉar ni intensas organizi U.KIn en la jaro 1981-a en Brazilo. Krome la sudamerika esperantistaro ne havis ĝis nun reprezentanton en la direktoraro de UEA.

Ni kore gratulas S-inon Ursula Grattapaglia pro ŝia nomumiĝo kaj deziras al ŝi plenan sukceson, kaj por ŝia sukceso ni ĉiuj estas prĉtaj kunlaboradi.

Alvenis la tempo, kiam nia movado bezonas niajn sincerajn klopodojn. Do, ni unuigu, ni helpu unuj la aliajn, ĉar Esperanto estas nia komuna idealo, ni batalu kune por plibonigi, pligrandigi kaj fortigi fine la esperantan movadon en Brazilo. Jam tempos, ke niaj tri organizaĵoj rekonu la gravecon de sia tasko kaj forlasu la malnovan kverelon inter du el ili, kaj interfratiĝu, kompreniĝante kaj kunlaborante amike, efike. Nia Konsilantaro revas por iu pli bona mondo!

FORTALEZA (CE) — Nia juna vicprezidanto D-ro Cesar Barros Leal, el Fortaleza, deziras fari grandskalan propagandon pri Esperanto en la Federacia Fakultato de Ceará kaj petas, ke aliaj vicprezidantoj de BKE volu sendi al li ĉiuspecan propagandmaterialon. Li deziras disvastigi Esperanton en la Fakultato, kie li laboras.

Ni afable petas ĉiujn helpi nian laboron samideanon. Ni anticipe dankas al ĉiuj. Jen lia adreso: — Avenida Luciano Carneiro, 2.500-ap. 22 - CEP. 60.000 - Fortaleza (CE).

VOLTA REDONDA (RJ) — Nia vicprezidanto D-ro Alberto Flores organizis kurson de Esperanto en la Fakultato de Filozofio, Scienco kaj Beletroj, kie li instruas ĉiusabate, de la 15-a ĝis la 17-a horo.

S-ano Flores fortostreĉas por disvastigi la internacian lingvon en tiu progresema urbo, kaj ĉar al li mankas tempo, li forlasis la instruadon ĉe la Teknika Fakultato por helpi la esperantan movadon per

sia tuta kapablo. Estas mirinda kaj respek-
tinda tiu agmaniero. Krom tiu laboro li
helpas la esperantajn organizaĵojn, dividan-
te la monon ricevitan inter ili.

En la sama urbo V. Redonda okazis
ĉijare la tiel nomita "Feira da Primavera"
(Printempa Foiro), kies kunordiganto es-
tis nia kara s-ino Clece Zamora Flores, lia
edzino, kaj filino de nia bone konata kaj
estimata s-ano Ari Zamora, el Rio Grande
do Sul. S-ino Clece en kadro de tiu foiro
vendadis kun granda sukceso esperantajn
kaj spiritismajn librojn. La tuta Familio
Flores estas indaga je admiro kaj laŭdoj.

BARRA MANSA (RJ) — Niaj karaj gesa-
mideanoj Denise kaj Wilson Deslandes, in-
formis al ni ĝojigan novaĵon: estis fondita
la "Barra Mansa Esperanto-Klubo"
(BAMEK), kaj okazis en la Fakultato SO-
BEU de la sama urbo ĝia fondiĝo, ĉeestinte
18 gelnantoj. Jen la unua estraro: —
Prez. S-ino Denise Deslandes, vicprezidan-
to Wilson Deslandes, 1-a sekr. Sergio Biol-
chini, 2-a sekr. Ligia Deslandes, kas. João
Alfredo Moraes dos Santos kaj bibl. João
Antonio da Rocha, Zorga Konsilantaro:
— Prez. Jane Maleck.

Membroj:— Neusa Gomide Rocha

Aurelialice Athaide da Cruz.

Honora Prezidanto:— Amarilio Carvalho.

Jen bonega ekzemplo de la simpatia
Familio Deslandes. Ili esperantigis antaŭ
nelonge kaj bonege laboradas por nia mo-
vado. Sincerajn gratulojn al Deslandes!

☆☆☆☆☆☆

CAÇAPAVA (SP) — Nia selanca vicprezi-
danto Gilberto A. Silva Velho organizis
en S. José dos Campos altvaloran esperan-
tan ekspozicion. Pri la evento la lokaj ga-
zetoj grandskale informis. La ekspozicion
multaj personoj vizitis kaj ĝi okazis en la
Publika Biblioteko de la urbo.

Li aŭdigis esperantajn muzikojn kaj
donis al ĉiuj bonegajn klarigojn pri la in-
ternacia lingvo. Ni kore gratulas nian
s-anon Silva Velho.

☆☆☆☆☆☆

CAMPOS (RJ) — En tiu progresema kaj
grava urbo gvidas esperantan kurson nia

vicprezidantino Maria Luiza Bilot subte-
nata de SEDAK. En la librovendejo "An-
dré Luiz" ĉiusemajne tri grupoj da geler-
nantoj (ĉirkaŭ 60) vizitas la kurson. Ni de-
ziras sukceson al S-ino Bilot por tiu laŭ-
dinda laboro.

☆☆☆☆☆☆

SAN-PAŬLO (SP) — Ek de la 4-a de sep-
tembro okazas kursoj en la sidejo de San-
Paŭlo Esperanto Asocio, ĉiudimanche de la
10-a ĝis la 11-a horo, ankaŭ.

☆☆☆☆☆☆

BAURU (SP) — Unu el la plej bone orga-
nizitaj societoj, cetere tre bele direktita
kaj respondeca estas la Baurua Esperanto
Societo. Ĝiaj direktantoj kaj anaro estas
klopodemaj, laboremaj kapablaj personoj.

Ĝi kunlaboras kaj helpas la San-Paŭlan
Esperanto-Asocion, BKE'on, respondas
leterojn, akceptas vizitantojn kaj ce la jar-
fino akurate faras kunvenon kaj sendas ra-
portojn al pluraj organizaĵoj. Ili voĉdonis
konfirminte la nunan estraron de BKE kaj
informis pri la nova estraro de la societo,
kiu nun estas la jena: Prez. Euclides Geral-
dis de Carvalho, vicprez. Nadyr do Nasci-
mento Serra, 1-a sekr. José dos Santos Si-
mas, 2-a sekr. Francisco Barbosa Bueno,
1-a kas. Maria Encarnação Moreno kaj 2-a
kas. Helena Moré.

Gratulante la novan direktoraron ni
deziras prosperon kaj fruktodonan labo-
ron al la estraranoj kaj societanoj.

Krom tio la societo planas aĉeti side-
jon kaj por tion realigi ili ne hezitas, sed
agas, organizante bazaron por akiri mo-
non tiucele.

Ili klopodas enkonduki Esperanton
en la Fakultaton kaj gvidas senĉese diver-
sajn kursojn. Ili meritas niajn sincerajn laŭ-
dojn kaj respekton.

Antaŭen bauruanoj! Sukcesu!

☆☆☆☆☆☆

SOROCABA (SP) — Ni ricevis la "Infor-
mo'n" de Sorocaba Esperanto-Klubo, kiu
sciigas pri la aktiveco de la klubo, pri la
kurso gvidata de s-ano Alfonso Selso; pri

la disaŭdigo de la 21-a ĝis la 22-a horo de sciigoj farata de la Radio-Klubo rilataj al Esperanto.

Krom tiuj aktivecoj la klubanoj disvastigas la Internacian Lingvon farante paroladojn.

Sorocaba Esperanto-klubanoj proponas unuigi la tri grandajn organizaĵojn, starigante unu solan, kion ni konsentas, sed ĉu la aliaj da aprobus la ideon?

El Sorocaba s-ano Ivan Alberto A. Dorretto partoprenis la lastan UK'on en Rejkjaviko. Ni esperas, ke li informu nin pri la novaĵoj, kiujn li havas.

La klubo havas 45 membrojn kiuj akurate aktivas. Ni deziras al ili daŭran sukceson.

☆☆☆☆☆☆

GAZETOJ RICEVITAJ — Ni ricevis la jenajn gazetojn, dankante la afablecon: — "O Democrata", el Indaiatuba (SP); "Diário do Cacau", el Ilheus (BA); "Tribuna Municípios", el Salvador (BA); "A Cidade de Santos", el Santos; "Estado de Minas", el Belo Horizonte (MG); "A Candeia" kaj "Correio Fraterno", el ABC; "Matutino Popular", el Caçapava; "Diário de Jacaré", el Jacaré (SP), kiu aperigas gravan artikolon de nia vicprezidanto D-ro Modesto Belmonte de Abreu; "Diário de Taubaté", el Taubaté (SP); "Correio do Povo", el Porto Alegre (RS); ili ĉiuj pritraktas la temon Esperanto. La gazeto "Tribuna dos Municípios", el Salvador (BA) aperigas gravan kaj grandan raporton pri la Lingvo Internacia kune kun la foto de la Zamenhofa busto, starigita en Santos dum la XII-a Seminario de Esperanto. La artikolo bone redaktita estas tre interesa propagando pri nia movado.

Estas vero, ke nian Seminarion partoprenis esperantistoj el Bahia grandnombre kaj bone reprezentis ili tiun gravan kaj ĉarmantan ŝtaton de Brazilo. Nia movado multe ŝuldas al gesamideanoj de Bahia. Ni petas al niaj bahianoj ke ili daŭrigu apogante BKE, ĉar ni ege bezonas ilian helpon.

S-ano Eleus M. de Sá informas, ke li faris diversajn paroladojn pri Esperanto en la Universitatoj de Ilheus kaj Itabuna. Ni kore lin gratulas.

☆☆☆☆☆☆

UBERLANDIA (MG) — Nia vicprezidanto Wutke esperantigis la libron "No Mundo Maior" — "En Pli Granda Mondo" de André Luiz, psikografita de Francisco C. Xavier, kaj eldonita de Federação Espírita Brasileira — Av. Passos, 30 — 20.000 — Rio de Janeiro (RJ).

Tiu eldonejo (Federação Espírita) multe disvastigas la Internacian Lingvon inter siaj adeptoj kaj tiel helpas nian movadon kreski en nia vasta lando. Jen kial ni devas rekonigi ĝian laboron, eldonante multajn librojn en Esperanto. La apogo de Prof. Altivo Ferreira, spiritisto el Santos, Sekretario pri Financo de nia Prefektejo, kiu estas amiko de nia prezidanto, ebligis al ni ricevi la piedestalon por la busto de Zamenhof, do, ni rekonas la helpan de la spiritistoj, al kiuj ni kore dankas pro ĉio farata, eĉ ne estante esperantistoj.

☆☆☆☆☆☆

BELO HORIZONTE (MG) — Vizitante la belan ĉefurbon de la ŝtato Minas Gerais, nia prezidanto Almada estis intervjuita de la gazeto "Estado de Minas", kiu aperigis sciigojn pri nia movado kaj laboro de la esperantistaro, sub la titolo "Professores divulgam o Esperanto".

Ni estis informitaj de nia vicprezidanto Onésimo Faria, ke en la "Instituto de Educação" ekzistas Esperanto-kurso, kiun gvidas s-ano Ismail Barbosa Teixeira. Krom tiu kurso li gvidas alian en la "Grupo União Espírita Mineira", kiu bone prosperas.

Ni gratulas al nia s-ano Ismail, kiu selace klopodas disvastigi nian idealon en la ĉarma urbo Belo Horizonte.

☆☆☆☆☆☆

ATENTUI!

La redaktorino ricevis diversajn petojn por publikigi rakontojn kaj aliajn literaturajojn. Bedaŭrinde nia Bulteno estas eta publikigaĵo kaj ni utiligas ĝin por la informado ĝenerala al nia anaro pri la marŝado de nia movado. Mankas spaco por literaturo. Ni rekonas, ke gesamideanoj ne konvinkiĝas, ke ni bezonas monhelpon kons-

tantan, tial ni ne eblas aperigi bonan gazeton.

Nia bulteno aperas dank'al helpo de komprenemaj gesamideanoj, kiuj scias, ke la aperigo de nia informilo postulas monon, kaj ke ĝi estas dissendata al niaj legantoj tute senpage, t.e., ĝi estas pagata por ĉiuj nur de kelkaj bonkoraj, malavaraj geamikoj; kio, tamen ne estas justa rilate tiujn, kiuj afable kontribuas. Ni ne postulas grandajn sumojn; ke oni helpu eĉ per poŝtmarkoj, ĉar ni ne ĉesos ekspedi la bultenon al ĉiuj, kiuj ĝin volas legi.

Al ĉiuj, kiuj helpas kaj helpos ni kore antaŭdankas kaj Dio lin rekompencu.

La Redakcio.

☆☆☆☆☆☆

MONSUMOJ RICEVITAJ

Hersila Valverde - Rio	100,00
D-ro Alberto Flores - V.Redonda	300,00
Gustavo B.Siqueira - B.Horizonte	20,00
Tuto	420,00

☆☆☆☆☆☆

SANTOS (SP) — Post la XII-a Seminario de Esperanto okazinta en nia urbo, multaj interesatoj volis lerni la Internacian Lingvon kaj nia prezidanto malfermis kurson en la sidejo de "Associação Atlética Banco do Brasil" depost la nuna monato, kiu ekfunkciis de la 1-a, vespere de la 20,30 ĝis la 21,30 horo.

☆☆☆☆☆☆

ITU (SP) — Laŭ informo de nia vicprezidantino Elvira Fontes, prezidantino de San Paŭlo Esperanto Asocio, oni instruas Esperanton en Fakultato de Itu, kaj ni intencas ricevi pli detalajn informojn pri la afero.

☆☆☆☆☆☆

LINGVAJ PRIKOMENTOJ

Kiam unu adjektiva epiteto karakterizas samtempe du aŭ plurajn substantivojn, el kiuj unu staras en singularo, ĝi devas mem stari en pluraro: "ni havas freŝajn pa-

non kaj akvon", kaj se oni dirus: "ni havas freŝan panon kaj akvon", nur de la pano ni asertus la freŝecon; inverse nur tiun de la akvo per: "ni havas panon kaj akvon freŝan"; "mi havas fidelajn amikojn kaj kolegojn", se oni dirus: "mi havas fidelan amikon kaj kolegon", oni komprenus, ke temas nur pri unu amiko-kolego. Zamenhof uzas singularan podesan adjektivon, kiam ĝi rilatas al pluraj substantivoj: "mia frato kaj fratino", ĉar tio neniam kreas konfuzon, tio estas ne nur allasebla, sed eĉ preferinda al la plurala formo (miaj), kiu sonas iel fremda. Oni povas ĝin eviti, cetero, ankaŭ per la ripeto de la poseda adjektivo (lia frato kaj lia fratino). Krome Z. uzas ofte singularan adjektivon antaŭ pluraj substantivoj abstraktaj: "la simpla lernado kaj uzado de Esperanto. Kiam pluraj epitetoj karakterizas unu pluralan substantivon, sed ĉiu el ili rilatas aparte al po unu el la aferoj ope montritaj de la substantivo, ili staras en singularo: "la malnova kaj nova Testamentoj" (malnova Testamento + nova Testamento); "la juĝista, komerca kaj financa ministroj" (laŭ Plena Gramatiko). "Kiel abonanto de via gazeto bonvolu publikigi mian anoncon. "Laŭ la citita frazo oni devas pensi, ke la redaktoro mem estas la abonanto. Ni kompletigu la frazon jene: "Kiel abonanto, mi petas bonvolu ..." aŭ "ĉar mi estas abonanto, bonvolu..."

POEZIO

Ho, Zamenhof,
Se vidus vi la nunan mondon,
kiel dolorus via nobla koro!
Oferis ĉion vi por suferantaj homoj,
sen rigard' al mono kaj honoro!
Sed tamen pli ol reĝo venkis vi:
Vi kreis veran mondpopolon!
Ĝi kreskos, kreskos, kreu nin,
iam ni havos pacon kaj bonvolon!
A.B.L.

ONI DEMANDAS

- 1) Kiu estas la aŭtoro de "Tra silento", originala poemaro en Esperanto?
- 2) Kio estas la origina nomo de "Heroldo de Esperanto"?

- 3) Kiu kondamnis Sokraton trinki venenon?
- 4) Kiu organizis la unuan Esperanto-kongreson?
- 5) Kiu verkis la romanon "Kiel akvo de l' rivero"?
- 6) Kiu estas la fondinto de la revuo "Nova Prismo"?
- 7) Kiu lingvo estas "Romanal" kaj kiu la aŭtoro?
- 8) Ĉu Karlo Vanselow estis prozisto?
- 9) Kiu estas la aŭtoro de "Ido"?
- 10) Kion fondis Hektor Hodler?
- 11) En kiu jaro aperis la unua libreto en Esperanto en la rusa lingvo?
- 12) Kiu estas la patro de la esperanta poezio?
- 13) Kiu tradukis Esperanten la unuan teatraĵon "Ifigenio en Taŭrido"?
- 14) Kie okazis la jubilea kongreso pro la 25-jara ekzisto de Esperanto?
- 15) En kiu jaro aperis "Ido" kaj estis fondita la Universala Esperanto Asocio en Ĝenevo?
- 16) Kiu kongreso ne povis okazi pro la mondmilito, 1914?
- 17) Kie oni parolas la Romanĉan Lingvon? Respondoj en la venonta bulteno.

NENIU PLU KREDAS, KE CIKONIOJ ALPORTAS BEBOJN

Estus egale naive kredi, ke nia Movado povas senpene reĵunigi sin.

Ne dubu, ke tiu reĵunigo estas nepra. La Movado, kiu levis Esperanton el la kategorio de planlingvo, tenas ĝin vivanta. Ĝi devas ankaŭ teni sin mem vivanta, kaj kapabla je vivregenero. Tio postulas konscian planitan agadon konstante allogi al la Movado novajn membrojn, junulojn inter ili. Nia Esperantosocio devas respeguli tiun ĝeneralan socion, kiun ni esperas konvinki pri la meritoj de la Internacia Lingvo. Kaj tiu konvinkenda socio estas juna socio.

Tejo estas la tegmenta internacia organizaĵo por la junularo. Ĝi strebas kunordigi kaj stimuli junularan agadon en siaj 28 Landaj Sekcioj kaj kie ajn alie ĝi okazas. En tiu grava laboro, TEJO bezonas kaj meritas la aktivan subtenon de la tuta Movado.

TEJO nia cikonio-servo

Mi volas fariĝi:

60,00 ☐ MJ-K KULTURA KOOPERATIVO DE ESPERANTISTOJ
 150,00 ☐ MA-K Av. 13 de Maio 47 — Rio de Janeiro, RJ
 45,00 ☐ Kto — oficiala reprezentanto de UEA —
 90,00 ☐ PT

ANIĜU
ANKAŬ
AL
BEJO!

Mi pagas al vi la sumon de per ĉeko pagebla
en Rio

Mia nomo: S-ro/S-ino/F-ino

Mia adreso:

Profesio: Naskiĝdato: *

Subskribo: Dato:

MJ-K: Individua Membro kun Jarlibro kaj, ĝis inkluzive 25 j., "Kontakto"

MA-K: Individua Membro-Abonanto kun Jarlibro kaj "Esperanto" kaj, ĝis inkl. 25 j., "Kontakto"

Kto-abono: Abono de "Kontakto", sen membreco de TEJO

PT: Patrona Membro de TEJO, ricevas "kontakto"-n kaj aliajn ĉefajn presaĵojn